

Biblio de Kralice

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 20-an de junio 2018
kaj Ekumena Esperantista Kongreso en Poděbrady (aŭgusto 2018)

Se vi volus traduki kaj eldoni signifan verkaĵon, kiu estas Sankta Biblio, kion vi bezonus?

1. Trankvilan lokon por via laboro.
2. Kolektivon de edukitaj kaj diligentaj kunlaborantoj.
3. Bone scii la lingvon, en kiun oni la Biblion tradukos, kaj la lingvojn de originalaj bibliaj tekstoj.
4. Presejon kun bona presilo.
5. Helpantojn kaj protektantojn.

En la 16-a jarcento kaj komenco de la 17-a jarcento en mia lando tio ĉio bonŝance ekzistis.

Husanaj militoj (1420-1434) estis 14-jara civitana milito kun defendoj de nia lando kontraŭ eksterlandaj kruckavaliraj militiroj. La 30-an de majo 1434, radikalaj husanoj estis venkitaj en batalo apud Lipany. Ili neniam estis venkitaj de eksterlandanoj, sed de koalicio de katolikoj kaj moderaj husanoj. Tiam ĉeĥoj venkis ĉeĥojn.

Post jaroj de senregado kaj mallongtempaj regadoj de Sigismondo Luksemburga kaj lia bofilo Albreĥto el Aŭstrio niaj landoj uzis pacon por ekonomia pliboniĝo. Albreĥto el Aŭstrio mortis de disenterio (1439) kaj post lia morto naskiĝis lia filo Ladislao Postmorta (1440), kromnomata Senbarbulo. Li estis malgranda, tial lin anstataŭis lia regento Georgo el Poděbrady (1420-1471). Lando ekonomie prosperis. Tial ĉeĥoj diradis: „Dum regado de la reĝo Senbarbulo unu ŝafo kostis unu groŝon (ĉeĥe: Za krále Holce byla za groš ovce.“)

Sed pli signifa ol bona ekonomia situacio estis religia toleremo. Danke al bona religia toleremo de la reĝoj Georgo el Poděbrady en mia lando povis kunekzisti malnovaj utrakvistoj, novaj utrakvistoj katolikoj, evangelikoj, Moravia Kunfrataro, luteranoj, kalvinoj kaj kelkaj aliaj eklezioj kaj sektoj (ekz. nikolajanoj, anabaptistoj, habrovanoj). Rilatoj inter la ekzelezioj ne estis bonaj, ekzemple Moravia Kunfrataro estis persekutata de katolikoj, sed ĉiuj povis ekzisti kaj evolui.

Regantoj super Bohemio kaj Moravio en la jaroj 1436-1637

1436-1437	Sigismondo Luksemburga
1437-1439	Albreĥto el Aŭstrio
1453-1457	Ladislao Postmorta (Senbarbulo)
1458-1471	Georgo el Poděbrady / <i>en Moravio kontraŭreĝo Matiaso Korvin 1469-1490</i> /
1471-1516	Ladislao la 2-a Jagela
1516-1526	Ludoviko Jagela
1526-1564	Ferdinando la 1-a Habsburga
1564-1576	Maksmiliano la 2-a Habsburga

1576-1611	Rudolfo la 2-a Habsburga
1611-1619	Matiaso Habsburga
1619-1620	Frederiko Palatinata
1619-1637	Ferdinando la 2-a Habsburga.

En tempo de renesanco niaj landoj renovigis siajn kontaktojn kun aliaj landoj, ekonomia situacio pliboniĝis, kulturo povis evolui. En mezepoko neniam antaŭe kaj neniam poste ĉeĥa lingvo sonis tiel bele estante riĉa kaj ornamita kiel en la 16-a jarcento.

En Bohemio kaŝitaj presejoj de Moravia Kunfrataro ekzistis en Litomyšl (1503) kaj Mladá Boleslav (1518).

En suda Moravio, proksime de la plej granda moravia urbo Brno, situas tri lokoj, kiuj en nia rakonto pri Biblio de Kralice ludas ĉefan rolon: urbo Ivančice, vilaĝo Kralice super Oslava kaj urbo Náměšť super Oslava.

La urbo Ivančice situas en konfluo de tri riveroj: Jihlava, Oslava kaj Rokytná. En la 16-a jarcento urbestro de Ivančice estis katolika, sed en la urbo funkciis Altlernejo de Moravia Kunfrataro, kies la plej fama rektoro estis germana pedagogo, filologo, fizikisto kaj historiisto Esrom Rüdinger (1523-1591). La altlernejo havis tiel bonan nivelon, ke tie kune kun junaj nekatolikoj studis ankaŭ filoj el katolikaj nobelaj familioj. Elstarulo de Moravia Kunfrataro estis la episkopo Jan Blahoslav (1523-1571).

Krome oficiala altlernejo en Ivančice 16 jarojn ekzistis kaŝita presejo de Moravia Kunfrataro. Kelkaj sciencistoj opinias, ke la presejo estis en la urbon translokigita el Szamotuły, kie jam en la jaro 1561 estis eldonita en ĉeĥa lingvo belega kantaro de Jan Blahoslav „Kantoj por laŭdoj de la Dio“ („Písně chval božských“), tiel nomata Kantaro de Szamotuły (Šamotulský kancionál). Inter fratoj estis edukitaj homoj, kiuj sciis ne nur grekan kaj latinan lingvojn, sed eĉ hebrean kaj aramean lingvojn. Ili kapablis traduki bibliajn tekstojn uzante ne nur latinan Vulgaton kaj grekan Septuaginton, klasikajn tradukoj de la Sankta Biblio, sed ankaŭ originajn hebreajn kaj arameajn tekstojn. Tial en kaŝita moravia presejo El Ĝardeno Insulo (Ex insula hortensis) estis kreitaj kvalitaj kaj valoraj tradukoj de bibliaj tekstoj.

La 30-an de junio 1577 Rudolfo la 2-a Habsburga eldonis sian mandaton „kontraŭ religiaj novaĵoj en Moravio“. Tio estis atako kontraŭ Moravia Kunfrataro kaj aliaj nekatolikaj eklezioj, ĉar enkadre de la mandato ekzemple romkatolika episkopo el Olomouc povis kontroli kaj cenzuri ĉiujn preparatajn presaĵojn.

Kiam danĝero de malkovro minacis al la presejo, moraviaj fratoj en printempo de la jaro 1578 la presejon kaŝe translokigis en vilaĝon Kralice super Oslava. Tie ili povis uzadi la presejon ĝis la jaro 1620.

La nomo de la vilaĝo Kralice (ĝis la 19-a jarcento nomata Králice) ne devenas de ĉeĥa vorto „králík“ („kuniklo“), kiel ŝercas nuntempa blazono, sed de la vorto „král“ („reĝo). Kralicanoj estis „homoj fidelaj al la reĝo“.

La teritorio apud romantikaj valoj de la rivero Oslava kaj la rivereto Chvojnice estis setlita jam en la 9-a jarcento (en epoko de Granda Moravio, 822-906). Pri nobelo Nikolao la 1-a el Kralice oni skribis jam en la jaroj 1310 kaj 1318. Ekde la jaro 1349 jam estas menciita fortikaĵo de Kralice. En la jaro 1466 la vilaĝo kaj la fortikaĵo estis damaĝitaj per la armeo de Matiaso Korvin. Ĉefa transkonstruado de la preĝejo de Sankta Marteno estis

faritaj en erao de Henriko Kralický el Kralice (†1576) en fino de la unua duono de la 16-a jarcento. Tiu nobelo konstruigis ĉe la gotika fortikaĵo renesancan palaceton, kiun poste vendis al sia nevo Johano la Pli Aĝa el Žerotín (†1583). Tial en la fortikaĵon de Kralice en printempo de la jaro 1578 povis esti kaŝe translokigita la presejo de Moravia Kunfrataro el Ivančice. La presejo estis kaŝita malantaŭ librobindejo. En la fortikaĵo troviĝis ankaŭ scienca librejo kun vortaroj de diversaj lingvoj. Kunfrataranoj fondis lernejon, kie lernis infanoj de Kralice kaj ĉirkaŭaĵo. Dum 42 jaroj (1578-1620) el la presejo estis eldonitaj 76 titoloj de libroj.

Tradukistoj kaj eldonistoj de la Biblio de Kralice

Ondřej Štefan († 1577)
Jan Eneáš ((† 1594)
Izaiáš Cibulka (1540-1582)
Mikuláš Albert el Kamének († 1617)
Lukáš Helic, baptita hebreo
Jan Blahoslav (1523-1571)
Esrom Rüdinger (1523-1591)
Jan Hlaváč (Capito) († 1589)
Jiří Strejc (Vetterus) (1536- 1599)
Jan Efraim († 1600)
Pavel Jessenius († 1594)
Adam Felinus, origine Adam Kocourek (1560-1598)
Samuel Sušický († 1599)
Jan Němčanský († 1598)
Zachariáš Ariston († 1606)
Zachariáš Solín († 1577)
Václav Elam († 1622).

Inter la tradukistoj estis edukitaj viroj, kiuj ĉefiĝis ne nur latinan kaj grekan (Vulgata, Septuaginta) antikvajn tekstojn, sed ankaŭ hebreaĵn kaj arameajn tekstojn. Tial la traduko estas tre valora.

Jan Blahoslav (1523-1571) ĉefiĝis Novan Testamenton. Lia traduko estis presita en kaŝita presejo de Moravia Kunfrataro en Ivančice en la jaro 1564. Post morto de Blahoslav liaj kunlaborantoj ĉefiĝis Malnovan Testamenton (1577).

La biblio de Kralice estis presita en presejo de Moravia Kunfrataro en Kralice sur Oslava en la jaroj 1579-1593. La sesa volumo de tiu sesvoluma Biblio estis traduko de Nova Testamento. Ĝi estis preta jam en la jaro 1593, sed eldonita nur en la jaro 1594. Por uzado en ordinara praktiko estis eldonitaj unuvolumaj Bibliojoj en la jaroj 1596 kaj 1613. Decembre en la jaro 1620 rezidejo de la presejo en fortikaĵo de kralice sur Oslava estis atakita de rajda taĉmento de marŝalo Buqoy [bukvoj], unu el militestroj de Katolika Ligo. Koleriĝitaj soldatoj, kiuj anstataŭ mono kaj oro trovis nur metalajn literojn, ilin elĵetis el fenestroj de la dua etaĝo en fosaĵon, kie jam estis multe da neĝo. tial multe da literoj restis en tero. La literoj ne rustiĝis, ĉar ili estis elfanditaj el alojo de stano (Sn), plumbo (Pb) kaj stibio (Sb).

Kiam Vlasta Fialová (1896-1972) arĥeologe esploris Fortikaĵon de Kralice, ŝi kaj ŝiaj kunlaborantoj, procipe gelernantoj de loka baza lernejo, en tero trovis pli ol 4000 metalaj literoj. Tio estis eŭropa unikaĵo! Multe da ekzempleroj de diversaj Biblioj ekzistas en muzeoj, sed metalaj literoj, kiuj estis uzataj por presado de la Biblio, estas raraj.

Post atako de soldatoj oni translokgis riparitan presilon en kastelon de Karlo la Pli Aĝa el Žerotín en Náměšť nad Oslavou.

Post eldono de la dokumento Restituta Landordo (kiu ekvalidis en la jaro 1627 en Bohemio kaj en la jaro 1628 en Moravio kaj Silezio) nekatolikoj devis foriri. Episkopo Jiří Erastus kaŝe alportis la presilon en Vroclavon, kie trovis sian azilon Karolo la Pli Aĝa el Žerotín, kaj post unu jaro ĝin ricevis azilanto Jan Ámos Komenský (1592-1970), kiu rezidis en pola urbo Leszno [leŝno]. Komenský uzadis la presilon en Leszno ĝis la jaro 1656, kiam ĝi estis neniigita per fajro dum revolto de polaj katolikoj.






En ekzilo Biblio de Kralice estis eldonita en Halle an der Saale (1722, 1745, 1766) kaj Bratislava (1787, 1808). En la jaro 1863 ĝi estis eldonita en Bohemio (Prago).

Korektitaj eldonojn en fino de la 19-a jarcento kaj la eldonon en la jaro 1915 preparis Jan Karafiát (1846-1929).

Referencoj

- ANONIMO: Biblií svatá aneb všecka svatá písma Starého i Nového zákona. Podle posledního vydání kralického z roku 1613. [La Sankta Biblio aŭ ĉiuj sanktaj verkaĵoj de la Malnova kaj Nova Testamento. Laŭ lasta eldono de Kralice el la jaro 1613; ĉeĥlingve]
- AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Písmo svaté Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj. [Biblio. La Malnova kaj Nova Testamento kun la Duakanonaj Libro; ĉeĥlingve]
- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libro tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [esperantlingve]
- BOHATCOVÁ, M. (1971): K dochování Blahoslavových spisů. Z Kralické tvrže, 5: 2-3.
- BRAMBORA, J. (1971): Balbín a Blahoslav. Paĝoj 91-93. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřístému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.
- ČAPEK, V. (1990): Historie bible. 3-a eld., Prago, Advent, 126 paĝoj.
- ČEJKA, M., ŠLOSAR, D. & NECHUTOVÁ, J. (1991): Gramatika česká Jana Blahoslava. 1-a eld., Brno, Masarykova univerzita v Brně, 429 paĝoj.
- ČERVENKA, J. (1971): Basilejský humanismus a Jan Blahoslav. Paĝoj 50-63. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřístému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.
- FIALOVÁ, V. (1971): Jan Blahoslav – zakladatel nejslavnější tiskárny Českých bratří. Z Kralické tvrže, 5: 29-35.
- FISCHER, O.A. (2012): Karolo la Pli Aĝa el Žerotín, <http://www.literatura.bucek.name/fischer/zerotin.html>
- FISCHER, O.A. (2013): Libro de libroj, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-libro-de-libroj.pdf>
- GREGOR, A. (1971): O Blahoslavově mluvnici. Z Kralické tvrže, 5: 4-9.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky českou minulostí, vol. 2, 1-a eld., Prago, Baronet, 454 paĝoj.
- HRUBEŠ, J. (1971): Několik poznámek na téma Blahoslav jako předchůdce Komenského. Paĝoj 32-35. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřístému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.

- HÝBL, F. (1974): Jan Blahoslav. 1-a eld., Přerov, Vlastivědný ústav, 7 paĝoj.
- JANÁČEK, J. (1966): Jan Blahoslav. 1-a eld., Prago, Svobodné slovo, 189 paĝoj.
- MOLNÁR, A. (1971): Motivy Blahoslavova pohledu na dějiny. Paĝoj 15-23. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.
- NĚMEC, F. (1971): Příčiny předčasné smrti Jana Blahoslava. Z Kralické tvrže, 5: 39-40.
- POLIŠENSKÝ, J. (1971): Jan Blahoslav – předchůdce Komenského. Paĝo 7. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.
- SETTARI, O. (1971): Jan Blahoslav jako hudební teoretik a hymnograf. Z Kralické tvrže, 5: 18-28.
- SKUTIL, J. (1971): Slovanské jazyky a nářečí v Blahoslavově Gramatice. Paĝoj 154-157. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.
- ŠLIZIŇSKI, J. (1971): Jan Blahoslav a Polsko. Paĝoj 88-90. In: BIMKA, S. & FLOSS, P. (eds.): Sborník studií k čtyřstému výročí úmrtí Jana Blahoslava. 1-a eld., Uherský Brod, Muzeum J. A. Komenského, 207 paĝoj.
- TICHÁ, Z. (1984): Cesta starší české literatury, 1-a eld., Prago, Panorama, 304 paĝoj.
- UHROVÁ, O. (1971): Kde byl pohřben Jan Blahoslav. Z Kralické tvrže, 5: 41-44.

<p>Dolní Kounice. En la jaro 1423 (?) husanoj neniligis premonstratan monaĥinejon Rosa Coeli (Ĉiela Rozo).</p> 	<p>Regantoj super Bohemio kaj Moravio en la jaroj 1436-1637</p> <p>1436-1437 Sigismondo Luksemburga 1437-1439 Albreĥto el Aŭstrio 1453-1457 Ladislao Postmorta 1458-1471 Georgo el Poděbrady</p> <p>/en Moravio kontraŭreĝo Matiaso Korvin 1469-1490/ 1471-1516 Ladislao la 2-a Jagela 1516-1526 Ludoviko Jagela 1526-1564 Ferdinando la 1-a Habsburga 1564-1576 Maksimiliano la 2-a Habsburga 1576-1611 Rudolfo la 2-a Habsburga 1611-1619 Matiaso Habsburga 1619-1620 Frederiko Palatinata 1619-1637 Ferdinando la 2-a Habsburga</p>	<p>Studenthejmo de Moravia Kunfrataro en Ivančice.</p> 
<p>Preĝejo</p> 	<p>Puto</p> 	<p>Monumento de Jan Blahoslav en Přerov</p> 



Ivančice. Tombeja kapelo de Sankta Triunuo, en kiu estis enkriptigita Jan Blahoslav (1523-1571). Li mortis en Moravský Krumlov (proksime de Ivančice).



Ivančice, Strato Ve sboru, monumento de Jan Blahoslav (1523-1571).
Urba blazono enhavas tri forpotajn por kovrado de asparago, kiu estis specialaĵo de Ivančice.

Tradukistoj kaj eldonistoj de la Biblio

Ondřej Štefan (* 1577)
Jan Eneáš (* 1594)
Izaiáš Cibulka (1540-1582)
Mikuláš Albert el Kamének (* 1617)
Lukáš Helic
Jan Blahoslav (1523-1571)
Esrom Rüdinger (1523-1591)
Jan Hlaváč (Capito) (* 1589)
Jiří Střelec (Vetterus) (1536-1599)
Jan Efraim (* 1600)
Pavel Jesenius (* 1594)
Adam Fellinus, origine Adam Kocourek (1560-1598)
Samuel Sušický (* 1599)
Jan Němčanský (* 1598)
Zachariáš Arison (* 1606)
Zachariáš Solin (* 1577)
Václav Elam (* 1622).

Kralice. Preĝejo de Sankta Marteno.



Ruinoj de fortikaĵo



Kralice, monumento de Biblio



La Dio estas la amo. - Bůh láska gest.



Monumento (muzeo) de Biblio de Kralice estis konstruita laŭ projekto de profesoro Bohuslav Fuchs en la jaroj 1967-1969.



Eldonoj de la Biblio post la jaro 1628

En Germanio: **Halle an der Saale** – 1722, 1745, 1766.
En Slovakio: **Bratislava** – 1787, 1808.
En Bohemio: **Prago** – 1863.